

Post la bru' kaj tumult'

M: WENN INS WOGENDE GRAS • KANTU 21



1. Post la bru' kaj tu - mult' dum la ho - roj de l' tag'
2. Ka - ra Di - o, por ĉi - o mi dan - kas al Vi,
3. Nun ri - po - zu la korp', re - fre - ŝi - ĝu l' a - nim',



fi - ne es - tas si - len - to en mi. —
ke mal - bo - non Vi mik - sis kun bon': —
sin no - vi - gu pro - fun - de la kor'. —



Nun mi ve - nas al mi kaj al Vi. —
Am - baŭ es - tas de - fi - o kaj don'. —
No - vajn tas - kojn al - por - tos l' aŭ - ror'. —

(4. Miajn zorgojn mi metas sur Vin, kara Di'.
Eĉ ne unu perdiĝos en Vi.
Morgaŭ ĉiuj revenos al mi.)

POST LA BRU' KAJ TUMULT' • M (Wenn ins wogende Gras): vaker-kanto el Teksaso • E
(originale verkita): Albrecht Kronenberger 2015-07-11 • 2017 en KANTU 21

La 4a strofo baziĝas sur eldiro de la tiama ĝenerala vikario de la diocezo Speyer (Palatinato, Germanujo), Hugo Büchler (1933-2005) en intervjuo:

«Ĉiun vesperon mi transdonas miajn zorgojn al Dio.
Do mi povas trankvile dormi. Kaj ĉiun matenon Dio
redonas ilin al mi plen-nombraj kaj sendifektaj.»